

Kluba Programo:**marto:**

- 6 Socia vespero (IBIS Shoreditch)
- 13 Helen Fantom: *Nefikciaj libroj de nia bretaro* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 20 Socia vespero (IBIS Shoreditch)
- 27 Jarkunsido

aprilo:

- 3 John Wells: *Lingva Seminario* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 10 Sankta Vendredo – neniun kunveno
- 17 Socia vespero (IBIS Shoreditch)
- 24 Maurizio Bartucci, Renato Corsetti, Maurizio Giacometto: *Ĉu vi parolas la Italajn?* (Kun praktikaj ekzemploj)



Maurizio Giacometto, Renato Corsetti

majo:

- 1 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)

Esperanta Kalendaro:

25 jul – 1 aŭg: 105a Universala Kongreso de Esperanto, Montreal, Kanado. <http://esperanto2020.ca/eo/chefpagho>
 17-19 aprilo: 101a Brita Kongreso, Big Shed Conferences, Leicester. <http://britakongreso.org>

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 19a aprilo por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



Florencio (Firenze): la hejmo de la norma lingvo en Italio

De la ekesto de la grandaj ŝtatoj en Eŭropo dum la Renesanco, oni disvastigis la ideon, ke ĉiuj bonaj subuloj parolas la saman lingvon, kiun parolas la reĝo. Ĉu oni ne parolas pri la *King's English* ĉi tie?

Aliflanke en Italujo ne estis reĝo ĝis lastatempe, kaj la unua reĝo prefere parolis france. Tio klarigas kial en Italujo oni ne parolas unu lingvon sed plurajn. Hazarde estas ĉirkaŭ la londona klubo tri italoj respektive el norda, centra kaj suda Italujo kaj ili povos doni al vi vivantajn ekzemplojn de la italaj lingvoj nuntempaj.

Fakte la lingva situacio en Italujo estas iom malsimpla. Post la unuiĝo de Italujo oni decidis, ke la norma itala lingvo estu bazita sur la dialekto de Florenco, sed neniun ekster la landoparto ĉirkaŭ Florenco parolis ĝin, kvankam ekzistis skriba tradicio pro la verkoj de Dante, Petraraca, Boccaccio, ktp. Cetere tiam oni ankaŭ ne havis la radiajn dissendojn kaj la vasta plejmulto de la loĝantaro estis ne-skribopova. Kiel vi instruas lingvon al tuta lando, sen radio, sen televido, sen ĵurnaloj. Post 60 jaroj la prezidanto de la Akademio de la itala lingvo resumis la situacion jene: florenca langvo en roma buŝo, alivorte la bazo ja estas florenca sed elparolata laŭ la parolmaniero de la homoj en Romo, kiu intertempe iĝis la ĉefurbo. Nuntempe oni ankoraŭ abunde uzas dialektojn kaj 7 aŭ 8 variaĵojn de la norma itala, sed ĉiuj, almenaŭ pasive komprenas la televidon. Interkrampe tiu prezidanto estis fama esperantisto, Bruno Migliorini, pri kiu ni parolos iom pli longe.

Renato Corsetti

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Old Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,
London E1 6BF (por diskutvespero)


Kutima programo ĉe Dioramo:
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 - 20:45 paŭzo
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").
Fervojo London Overground: Euston
Busoj: 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453.
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"
"Metropolitan").
Busoj: 15, 25, 115, 135, 205, 242, 254.

Kotizoj: £15 jare; fora membro: £9 jare.
Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346
rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta:
Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14
7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Mi esperas, ke vi fartas bone, kaj ke vi taksas bonaj viajn unuajn du monatojn de la nova jaro.

Certe, mi taksas la komencon de la jaro sukcesa rilate al LEK. Malgraŭ la manko de kunvenoj dum la kristnaska periodo, lastatempe okazis du el la plej ŝatataj eventoj en la kalendaro de LEK. Dum vespero Zamenhofa, klubanoj ĝuis teatraĵon, kiam multaj Esperantistoj spertaj kaj freŝbakitaj rolis en Hamleto. Kaj, kiel kutime, ni bonvenigis la novan jaron dum nia unua evento de la jaro, nia novjara festo.

Baldaŭ okazos alia grava evento en nia kalendaro, la komuna vespermanĝo. Dankon al Daniel pro lia prizorgado rilate al tio. Mi certas, ke ni ege ĝuos kaj la manĝaĵojn kaj la babiladon dum la vespero.

Okazos la jarkunsido la 27an de marto. Mi esperas, ke multaj povos ĉeesti. Se vi havas bonajn ideojn pri la estonteco de la klubo, bonvolu ĉeesti la jarkunsidon kaj informi nin pri ili. Aŭ eĉ pli bone, pensu pri aliĝo al la konsilantaro! LEK bonvenigus novajn konsilantaranojn, kiuj povus stiri la klubon per siaj ideoj. Bonvolu paroli al mi aŭ al alia ano de la konsilantaro, se vi taksas la ideon interesa, kaj volas scii pli pri tio.

Chris Lewis

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: Chris Lewis: chrisandelifl Lewis@yahoo.co.uk; Renato Corsetti: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk; Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com; Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

